

John Ellerton,
 Du lässt den Tag, o Gott, nun enden
tradukita de Raymund Weber

Argiope-informo:
 La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
 Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

John Ellerton,
 Ni estis ja en mano Dia
tradukita de Manfredo Ratislavo

1. Ni estis ja en mano Dia,
 dum brilis super ni la Sun'.
 Protektu nin per mano Via
 dumnokte, Dio, ankaŭ nun!
2. La ter' cirkulas ĝis la veno
 de l' nova tag', ripozas ni
 dum tiu nokt' en Via beno²
 ĝis la mateno, kara Di'.
3. Nun kiam en malhel' fordronas
 la Sun' en tiu ĉi vesper',
 multvoĉe Via laŭdo sonas
 alialoke sur la Ter'.
4. Ĉar kiel estas ĉirkaŭanta
 la Teron lumo de l' maten',
 senĉese estas plusonanta
 preĝado de la homoj jen.
5. Ja estas, Dio ĉiopova,
 senlima Via regno, nin
 konduku al la tago nova
 en Via regno je la fin'!

...

John Ellerton,
 Forpasis tiu tag', Sinjoro
tradukita de Frieder Weigold

1. Forpasis tiu tag', Sinjoro,
 Kaj profundiĝas la senlum'.
 Vi gardis nin de ajn doloro.
 Nin gardu ankaŭ dum noktum'!
2. Ni rotacias en la tagon.
 En nokta paco dormas ni.
 Kaj portas lumon trans la maro
 La suno, kie brilas ĝi.
3. Senĉese kiel la mateno
 Briladas super tera rond',
 Eksonas laŭdo pro la beno
 Al ĉiu sur la vasta mond'.
4. La suno, kiu ĵus subiris,
 Ja brilas en plu fora land'!
 La gloron, kiun ni admiris,
 Anoncas plu preĝada kant'.
5. Pereas regnoj. Tiel estu!
 Kaj sole staras via tron',
 Ke sole via regno restu
 Je fina tag' sub unu kron'.

...

²aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 – †1893-06-15) en la Germanan de Raymund Weber.*

Arg-130-256 (2008-11-08 15:30:25)

Diese Übertragung ins Deutsche ist abgedruckt in dem Gesangbuch der Katholischen Kirche in Deutschland "Gotteslob", in der neueren Ausgabe. Der Text mit den Muziknoten findet sich auch auf der Heimseite http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf.

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2004-01-10.*

Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.*

Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)

Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro "Gotteslob" (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf.